



FLANDRA ESPERANTISTO

MONATIA REVUO
ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO :

Publika Letero al la Estraro de "Belga Ligo Esperantista". — Du Versaĵoj. — Utopio. — 1830-1930. — Flandra Kanto Esperantigita. La Fiŝkaptisto. — Kalumnio. — Kontraŭmilitema Kanto. — Subteno por nia revuo. — Milito kontraŭ la milito! — Reĝa maldeco. — 1a Flandra Kongreso de Esperanto. — Esperanto door zelfonderricht. — Inter ni. — Bibliografio. — Ricevitaj revuoj. — Korektoj.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Tarifo por anoncoj : 1/1 paĝo, fr. 125.— ; 1/2 paĝo, fr. 70.— ;

1/4 „ , fr. 40.— ; 1/6 „ , fr. 30.— ;

1/8 „ , fr. 25.—. Perantoj ricevas rabaton.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto - Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

Publika Letero al la Estraro de "Belga Ligo Esperantista".

Jam de longe, sinjoroj, mi ja volis diri al vi tion, kio estas de multaj aliaj tro longe silentata: ni ne pli longe povas resti en la Belga Ligo.

Ni ne pli longe povas resti pro diversaj kialoj.

Precipe pro la konstanta neado de la Flandroj en la Ligo mem. Mi persone partoprenis jam multajn belgajn esperanto-kongresojn kaj povis konstati, ke la flandra lingvo por la gvidantoj de la Ligo estas verŝajne tro malnobla. En Bruĝo, en De Panne, en Mons, en Gento, ĉio estis ekskluzive franca. En De Panne eĉ ne mankis la franca flago kaj en Mons la urbestro nin bonvenigis atentigante nin pri la fakto, ke „en ouvrant la fenêtre nous respirons l'air de la France" (malfermante la fenestron, ni enspiras la francan aeron). Ho! kian bonon tiu „air de la France" certe faris al la prezidanto de la Ligo, kiu tutkore deziras, ke Flandrujo neniam akiru sian rajton, — al sekretario, kiu ŝatas kaŭzi lingvajn malfacilaĵojn, — al estrarano, kiu disaŭdigas ekskluzive francajn paroladojn per „Radio-Belgique."

Neŭtrala! Ĉu estraro, kiu nur ekzistas el liberale tinkturitaj sinjoroj kaj loĝi-fratoj? Ĉu estas neŭtrale kondukti kiam, kiel dum la kongreso en Gento, oni senproteste toleris de estrarano publikan propagandon por la liberala listo de malantaŭ la estrara tablo?

Neŭtrala! Jes, nur tiam kiam koncernas monpumpado el la grupaj kaso.

Ĉar, verdire, kion la grupoj havas en la Belga Ligo? Rajton por pagi

kaj rajton por silenti. Pagi por organo, kies numeroj subite je l' fino de l' jaro amase alvenas kaj estas — kiel en 1928 — rekomendita de la liga prezidanto kiel unika (?) dokumento. Pagi por la duba honoro havi la permeson presigi la nomon de Belga Ligo apud la grupa nomo. Pagi por ricevi dum tuta jaro nenium novaĵon!

Rajton por silenti. Ĉar, kiel okazis en Bruselo, se necese oni prokrastas la matenajn voĉdonadojn ĝis la posttagmezo, por permesi al la prezidanta klano — post la vizito al Laken — voĉdoni prezidanteme; por, kiam kelkaj plendas aŭ koleretas pro la forresto de la organo, silentigi ilin per rideto; por, kiel en ankoraŭ multaj aliaj okazoj, afable esti trompata kaj kontentigata per bagatelo.

Kion vi diras do, ligestraranoj, en la decembra numero de „Belga Esperantisto,” pri fiereco kaj kontenteco?

Fiereco kaj kontenteco? Ĉu ĉio estas do tiel perfekta en la Belga Ligo? Ĉu via farita laboro estas do tiel laŭdinda? Ni estas tiel senĝenaj havi alian opinion pri tio. Ni, tio estas multaj aliaj kaj mi. Multaj aliaj, kiuj morgaŭ kunhelpas kiam la signalo estos donata; multaj aliaj, kiuj jam senpacience atendas la Pentekoston por iri al Antverpeno; multaj aliaj, por kiuj Esperanto ne estas *industrio* sed *idealo*.

Ligestraranoj, ni ne plu toleras vian agadon: ni foriras el la „Belga Ligo.”

Ni sentas, ke nia loko ne plu estas en kontraŭnatura kaj artefarita ligo. Ni ne plu toleras tiun mensogan neŭtralan kirason ĉirkaŭ la lumboj kaj postulas por ni liberan vivon en libera Esperantujo.

Ligestraranoj, la kontoj estos baldaŭ reguligataj!

MAX VAN GHENDT.

DU VERSAĴOJ

de Cath. J. Roskes-Dirksen.

SE EN ARBAR'.

Se en arbar' la birdoj dolĉe kantas,
La foliaro flustras en vesper',
Meditoj kaj revadoj miaj vagas
For de la ter'.

Se tiam vi, ho brilo de la luno,
Heliĝas ĉion, kvazau sorĉa sfer',
Animo mia tremas kaj silentas
Pro la mister'.

ĜOJO.

Animo mia kantas
En vintro kaj somer',
Ĝi kantas melodion
El nekonata sfer'.

„Ho, kion ĝi kantadas
Kaj kial”, petas vi.
„Ne povas mi ĝin diri
Ĉar ĝin ne scias mi”.

Utopio.

Denove oni parolas pri vasta centrigo de la tuta esperantistaro en unu sola organizaĵo. Oni ja rakontas, ke detala plano estis prezentita dum la Universala Kongreso en Budapeŝto, sed en tiel mistera kunveno, ke „nur tre malmultaj personoj aŭdis pri ĝi.” Vere estas, ke la ciganaĵoj muzikoj tiel bruas kaj la gekongresanoj tiel amuziĝis! Tial „Heroldo de Esperanto” publikigis la tutan planon en sia numero de la 1 novembro.

Kion do celas tiu sekreta komisiono, kies neniu membro estas publike konata? Unuigi ĉiujn esperantistojn en unu sola asocio, — krei centran direkcion de la Esperanto-movado, — kunvoki esperantistan *Parlamenton*.

Jen skemo de la tuta projekto, kiu faciligos la komprenon de la pretendoj de la Komisiono.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Naciaj societoj esperantistaj

(Germana Esperanto-Asocio, Societo Franca por la propagando de Esperanto, ktp.)

Lokaj grupoj

(Grupoj en Köln, Graz, ktp.
ĉu katolikaj, ĉu alitendencaj)

Faksocietoj

(Poŝta, Instruista,
Polica, Scienca)

Izoluloj

(S-roj K., B.
Z., H.)

sub unu sola Centra Direkcio

Kiel klarvide oni volas ĉion nun ekzistantan niveligi por konstrui novan establaĵon. Kaj la ideoj ne estas novaj! Tute ne! Ni jam antaŭe aŭdis pri ili. Ŝajnas al ni, ke denove estas ie iuj, kiuj deziras fariĝi eminentuloj. Kaj tiucele ili elpensis tiun utopian projekton.

Utopio ja estas!

Utopio: voli ĉiuforte kaj kontraŭnature alcentrigi. La nuntempa emo universala estas male decentrigi; rigardu ĉiufranken: malgrandaj nacioj, provincaj registaroj, fakaj asocioj, specialaj grupoj. Kaj pro kio? Ĉar troa alcentrigo estas danĝera: ĝi ja kreas despotojn, kiuj neniel atentigas la rajton de malpli fortuloj ol ili. Ĉar alcentrigo egalas engluton, kaj ke neniu deziras esti englutita, eĉ en vasta stomako de gigantulo.

Kaj tio estas tiel vera, ke la projekto pretendas engluti ĉiujn societojn, ankaŭ la laboristan Esperanto-movadon (SAT) kaj la katolikan (IKUE), konsiderataj de la Komisiono kiel „skismo forigota.” La ambaŭ internaciaj societoj ne devas plu ekzisti; tion deklaras la Komisiono. Nur unu

rajtas por vivi: la ĵus elpensita Universala Esperanto-Asocio, kiu anstataŭas la nun ekzistantan asocion samnoman.

Utopio: voli grupigi ĉiujn esperantistojn en unu sola asocio, ĉu ke ili estas sovetaj, ĉu ke ili estas katolikaj, ĉu ke ili estas iaj ajn; ĉar ĉiu individuo uzas la internacian lingvon iacele, kaj la celoj estas ĉiam malsimilaj kaj ofte kontraŭaj. Kaj estas homa bezono grupiĝi kun samuloj por trafi komunan celon. Ĉu do la esperantistoj...?

Sed la Komisiono pretendas havigi al ĉiuj esperantistoj en la projektita unika asocio grupigitaj unu solan celon: „la ĝenerala rekono de Esperanto per la registaroj de l' tuta mondo.” Sed...

Utopio: pretendi ke la registaroj ŝtataj oficialigos Esperanton, ĉar ekzistos unu sola asocio multnombra, kiu al ili tion proponos pere de voĉdonado de ĝia Parlamento.

La nuna agado de asocioj tute apartaj, kiel SAT kaj IKUE pli sukcese laboras por la akcepto de la helplingvo en la internaciaj rilatoj ol ĉiuj referatoj de iu ajn Centra Komitato.

Lingvo fariĝas nepre necesa per ofta kaj multnombra uzado, tute ne per raciaj argumentoj.

Utopio! Utopio! Utopio!

*
* *
*

Krome ke tiu projekto estas utopia, ĝi ankaŭ estas nova atako de la „neŭtraluloj” kontraŭ la celdefinitaj Esperanto-movadoj, sekve kontraŭ nia Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Ĝi ja devus malaperi.

Ne devas plu ekzisti Katolika Esperanto-Movado, dekretas la Komisiono. Ne devas plu eliri „Espero Katolika,” dekretas la Komisiono, ĉar aperos nur unu internacia gazeto neŭtrala, eldonata de la Centra Direkcio. Tio samsignifas ol: la internacia helplingvo ne devas plu esti katolike uzata. Kiarajte do tiel ordonas tiu fantoma Komisiono? Ĉu do Esperanto ne plu estas uzebla de iu ajn, por ia ajn celo, kiel ĉiuj aliaj lingvoj? Ĉu do la katolikoj ne plu rajtas grupiĝi, eĉ internacie, se tio plaĉas al ili? For la diktatoro!

Ni, katolikaj esperantistoj, pretendas tutlibere uzi niajn rajtojn: utili Esperanton por la Katolika Agado, grupiĝante en IKUE. Kiel katolikoj ja — kaj ni estas unue katolikoj kaj nur poste esperantistoj — ni dependas de neniu, ol de la Katolika Hierarkio. Kaj ni bone scias, ke la tuta Eklezia tradicio, ke la Papaj instruoj nepre malpermesas al ni aliĝi al neŭtrala-liberalisma movado.

Tial la katolikaj esperantistoj devas pli kaj pli apartiĝi de la neŭtrala Esperanto-Movado. Plue tiu konduto estas la sola rimedo por vere kaj efike enmeti la internacian helplingvon je la servo de Katolikismo.

Georges RAMBOUX, *presbitero.*

(El „Espero Katolika.”)

1830 - 1930.

Funebra Datrevena Festo por la Flandroj.

B. ADMINISTRADO - LINGVAJ LEĜOJ.

La Konstitucia Komisiono, en sia kunsido de la 27a. de Decembro 1830, akceptis la sekvontan artikolon (sub no. 23) pri la lingva aranĝo: — „La uzado de la en Belgujo ekzistantaj lingvoj estas laŭvola; ĝi nur povas esti reguligata per la Leĝo kaj nur por la aktoj de publika aŭtoritato kaj por la juĝaj aferoj.”

Per konstanta insistado estiĝis la „lingvaj aferoj,” sed jam la fakto nur, ke necesas LINGVAJ leĝoj por aljuĝi naturan rajton al la flandra loĝantaro, montras la malsanan situacion devenintan de la „sistemo” de Charles Rogier, malkarmemora. La faktoj, kiuj sekvas, karakterizas la longan kalvarion je administracia vidpunkto.

1844. La registaro aprobas la unuigon de la nederlanda ortografio.
1850. En leĝo de la 1a. de Junio staras la platonika deklaro, ke la flandra lingvo estos instruata en la mezgradaj oficialaj lernejoj.
1854. Novembro. Kurso de nederlanda lingvo kaj literaturo estas organizata ĉe la universitato en Gent.
1860. Ministro Van der Stichelen enkondukas dulingvajn surskribojn ĉe la stacidomoj de ŝtataj fervojoj.
1861. La akcepta ekzameno ĉe universitatoj povas esti farata parte flandre.
1873. Unua lingva leĝo pri la juĝaj aferoj. (Edw. Cooremans).
1878. Administracia lingva leĝo (Johan De Laet). Organizo de flandra „Resuma Parlamenta Raporto.”
1879. Enkonduko de flandra vagonarlibro.
1883. Lingva leĝo Devigne-Cooremans enkondukanta kelkajn flandrajn kursojn ĉe la Ateneoj.
1886. Unuaj flandraj moneroj (Ministro Beernaert), en 1888 sekvataj de dulingvaj monbiletoj.
1888. Tre nesufiĉaj lingvaj ordonoj pri la instruado ĉe la Militlernejo (amendamento Buls k.a.).
1889. Aldona lingva leĝo pri la juĝaj aferoj (Devigne-Cooremans).
1890. Lingvaj ordonoj pri enoficigotaj juĝaj oficistoj en Flandrujo, aplikeblaj depost 1895 (Helleputte).
1891. Lingva leĝo, tre nekompleta, pri la Apelaciaj Juĝejoj de Bruselo kaj Lieĝo (Cooremans-Lejeune).
1893. Flandraj poŝtmarkoj (Van den Peereboom).

1894. Flandra ĵuro permesata (Begerem). Estas la ununura lingva leĝo kiu estis aljuĝata sen kontraŭstaro!
1895. La ŝtata gazeto dulingvigata (Begerem).
1896. Lingva leĝo pri la Civitana Soldataro (Flor. Heuvelmans).
1898. Egaleca leĝo. La nederlanda ankaŭ akceptata kiel oficiala lingvo (De Vriendt-Cooremans).
1899. Parta flandra proceduro ĉe la militaj juĝejoj (J. Van der Linden).
1908. Lingva aranĝo, — parte — por la Krima Kortumo de Brabant (Van der Linden-Renkin).
1908. Nekontentiga aljuĝo de lingvaj rajtoj en Kongo.
1913. Soldatara leĝo. Tre nekompleta pro la neakcepto de la flandraj proponoj (van Cauwelaert).
1914. Instrua leĝo (van Cauwelaert).
1921. Administracia leĝo. Fakte malantaŭeniĝo ĉar ĝi favoras la dulingvecon en la Publikaj Administracioj en Flandrujo (van Cauwelaert).
1923. Parta flandriĝo de la universitato en Gent. Pedagogia abomenindaĵo, kiu prave estas „bojkotata“ de la studentoj kaj nomata „Nolf-barako“!
1928. Reviziata militistara leĝo. La proponoj de la flandraj naciionalistoj ne estas akceptataj kaj la sola bona solvo: „Flandraj kaj Valonaj regimentoj“ ne atingata.

Ciuj tiuj leĝoj kaj leĝeloj estantaj sen „sankcioj,” estas laŭplaĉe fuŝataj kaj senpune kontraŭagataj de la ministrejaj oficejoj. La neaplikado de la leĝo estas volonte rekompencota!

La *urbaj konsilantaroj* interkonsiliĝis kaj administris en Flandrujo de 1830 ĝis 1860 preskaŭ nur france.

Antverpeno donis en 1861 la signalon de la flandriĝo (Lod. Gerrits). Gent sekvis multe pli malfrue. Laste sekvis Leuven, Meĥleno, Kortrijk kaj Ieperen.

La *provincaj konsilantaroj* — influataj de la nobelaĉaj provincestroj — sekvis ankoraŭ pli longtempe la francan al kutimiĝon. Unue flandriĝis Antverpeno, poste Orient-Flandrujo, poste Okcident-Flandrujo kaj Limburgo. En Brabant restis franca faradaĉo.

(Daŭrigota.)

K. A.

FLANDRA KANTO ESPERANTIGITA.

LA FIŝKAPTISTO.

(*Malnova flandra kanto.*)

Dum vintro kiam pluvas,
Tra la malseka voj', ja voj',
Eliras fiŝkaptisto
Por fiŝi, kia ĝoj', ja ĝoj',
Kun sia pako, kun sia sako,
Kun sia kano en sia mano,
Kun siaj belaj, ledaj botoj,
Li gaje marŝas tra la voj'.

Sed la muelistino
Ekstaris ĉe la pord', ja pord' :
„Ne iru, fiŝkaptisto,
Ĝis la rivera bord', ja bord',
Kun via pako, kun via sako,
Kun via kano en via mano,
Kun viaj belaj, ledaj botoj,
Vi gaje marŝas tra la voj'.”

— „Malbonan kion faris
Mi, ĉarma junulin' ? ja mi ?
Kaj kial tie staris
Vi haltigante min ? ja vi ?
Kun mia pako, kun mia sako,
Kun mia kano en mia mano.
Kun miaj belaj, ledaj botoj,
Mi gaje marŝas tra la voj'.

— „Ho vi neniel pekis,
Mi ne kulpigas vin, ja vin,
Sed antaŭ ol foriri
Trifoje kisu min, ja min,
Kun via pako, kun via sako,
Kun via kano en via mano,
Kun viaj belaj, ledaj botoj,
Vi gaje marŝu tra la voj'.”
Tradukis OSKAR VAN SCHOOR.

Kalumnio.

de ALEXANDER VER HUELL.

— Ĉu estas por tiu maljuna Mario, pri kiu oni tiom multe klaĉis? —
Klaĉis! — klaĉis! — estas tiom klaĉita: tion ili tie ĉi ĉirkaŭ mi ankaŭ
bone scias. — Klaĉis!

— Jes, sed aŭskultu do, kiam oni tiom klaĉas, estas preskaŭ ĉiam io
vera en tio! —

— Vera! — vera! — Jasper, kiu mendis ŝian tombon, tie ĉi apud
ŝia patrino, kaj ŝin servas jam tiel longtempe, diris al mi, ke estas ĉiuj
malpiaj mensogoj; ke ŝi ĉiam estis gaja knabino; sed senmalica kiel
kolombo, kaj tiel bona kiel bela. — Klaĉis! — klaĉis! Skribis! ĉar kiam
ŝi estis reveninta de la vojaĝo, kiun ŝi estis devigata fari pro sia saneco,
sennoma letero, li diris, donis al ŝi ŝian mortfrapon.

— Klaĉis! — mensogis! — kalumniis! Sed kiel vi vidas, virino Jansen
— la senkulpeco krevas kaj la kalumnio daŭrigas vivi! — tiu maljuna
besto. Kalumnio! Se mi ankoraŭ iam por ĝi povus fosi tombon, eĉ se
ĝi devus esti tiel profunda kiel la preĝejturo estas alta, same vere kiel
iu Dio loĝas en la ĉielo, mi tion farus kun plezuro, kiom ajn maljuna
mi estas.

Tradukis MARTHA VERVLOET.

KONTRAUMILITEMA KANTO.

Sufiĉaj jam mortis, sufiĉaj suferis
laŭ plaĉo de l' diplomatio!
Sufiĉajn el niaj infanoj oferis
ni al la milita falsdio!
Sufiĉe la blinda perforto detruis!
Sufiĉe da sango popola jam fluis!
Ne klaĉu pri reĝo, patrujo kaj gloro:
ni dankas pro tia honoro!

Gepatroj, vidvinoj, georfoj, en preĝoj
vi veran konsolon ne trovas,
ĉar viajn mortintojn la dioj kaj reĝoj
redoni al vi ne scipovas!
Vi tute ne ŝatas la kriman militon:
al vi ne alportas ĝi iun profiton!
Ekkriu je nova milit' en la landoj:
„Batalu militprofitantoj!”

For ĉiuj pafiloj! For ĉiuj kanonoj!
For ĉiu mitral' kaj haladzo!
La ŝtalajn armilojn nun ĉiujn ni, homoj,
reforĝu plugilojn de l' paco!
La paco tutmonda ne restu ĥimero:
ekregu la Amo nun sur nia tero!
Por nia homar' la milit' estas honto
kaj ĉies patrujo... la mondo!

JAN VAN SCHOOR.

Menciita en la XIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.

SUBTENO POR NIA REVUO.

W. C. 20.—; Jan, 10.—; Mart, 10.—; Fik, 10.—; Gis, 10.—; M. V., 10.—; Piet, 20.—; lotumado dum Kristnaska festo de Flandrema Grupo Esperantista, 200.—; monkolokto post humoraĵo de s-ro Heirman de la „Hobokena Grupo” dum la sama festo, 66.—; Sta. Nikolaaĵ bolŝevistoj, 37.—; bolŝevistoj el Aalst, 12.—; Van Herzelee, 10.—.

Entute: 415 fr.

Milito kontraŭ la milito!

Homoj, savu viajn infanojn el la mizero kaj krimo de nova milito!
La militarismo montriĝas pli kaj pli diable kaj sovaĝe. Ĝi minacas
per sia sufoka spiro la vivon de milionoj da homovivoj.
Ĉu ni toleros tion pli longtempe?

Esperantistoj, kion vi faras kontraŭ ĝi?



HODIAU MI, MORGAU VI!

La sama sorto, kiel tiu de la kuracita (!!) vundito, kies foton ni
montras al vi kaj kiu aperis en la libro „*Krieg dem Kriege*” de
Ernst Friedrich, la sama sorto atendas vin se vi ebligos novan militon!
Kontraŭbatalu la militon! Rifuzu murdi viajn fratojn, rifuzu mortigi
eble kelkajn el viaj samideanoj!

REĜA MALDECO.

Nia nederlanda samideano H. J. Bulthuis, kies majstran tradukon de "La Leono de Flandrujo,, ni recenzis en nia antaŭlasta numero, oferis luksan ekzempleron de sia traduko, de la ĉefverko de Conscience al lia reĝa Moŝto Albert I, alnomata de la Flandroj la Multonpromesanta.

Jen kopio de la dediĉo :

Ĉi tiun tradukon
en la internacia lingvo

Deze vertaling
in de internationale taal

ESPERANTO

de unu el la plej belaj verkoj
de nobla Flandro
mi dediĉas
Al Lia Reĝa Moŝto Albert
de Belgujo,

van een der schoonste werken
van een edelen Vlaming
draag ik op
Aan Zijne Majesteit Koning
Albert van België,

memore al la tiel fama
Batalo de la Oraj Spronoj.

ter herinnering aan den
zoo beroemden
Gouden Sporenslag.

Respektplene,
La tradukinto,

Met allen eerbied,
De Vertaler,

H. J. BULTHUIS.

den Haag, Juli 1929.

Kaj jen la kopio de la dankletero, kiun ricevis s-ro Bulthuis :
Légation de Belgique

A. 5 n° 4364

La Haye, le 12 septembre 1929.

Monsieur,

J'ai l'honneur de vous faire connaître que Mr. le chef du Cabinet du Roi, mon Auguste Souverain, a remis à Sa Majesté l'exemplaire de la traduction en esperanto que vous avez faite du livre de Henri Conscience, intitulé "Le Lion de Flandre".

Sa Majesté m'a chargé d'avoir l'honneur de vous transmettre ses sincères remerciements pour la gracieuse attention que vous avez eue de lui faire hommage de ce volume.

Veuillez agréer, Monsieur, l'assurance de ma considération très distinguée.

Le Chargé d'Affaires de Belgique

HEYNDRIKS.

a. i.

Monsieur H. J. Bulthuis
Kamillestraat, 37

Den Haag.

Franca dankletero al esperanto-nederlanda dediĉo de tia libro de reĝo de 4 milionoj da Flandroj kaj 3 milionoj da Valonoj! Ĉu necesas komentarioj?

1a Flandra Kongreso de Esperanto.

Antverpeno, 7an-8an-9an de Junio 1930.

DIVERSAJ SCIIGOJ. — Krom „Flandrema Grupo Esperantista,” „La Rekta Vojo,” „Nia Ideo” kaj „Hobokena Grupo,” ankoraŭ ofi-



ciala aliĝis al la Organiza Komitato: la neŭtrala grupo „Suda Lumo”
— La propagandaj glumarkoj estas haveblaj po 5.— fr. (1 belgo)
por cent. La kongresaj poŝtkartoj estas presataj kaj la afiŝoj presotaj.

— La partoprenantoj de nia kongreso havos *rabaton de 35%* sur la belgaj fervojoj.

— La aliĝiloj estu resendotaj *kiel eble plej baldaŭ* por plifaciligi la laboron de la sekretario.

— Jam de nun ni povas certigi, ke la 1a. Flandra Kongreso de Esperanto ombrigos ĉiujn naciajn kongresojn. La organiza komitato zorgas por igi ĝin grandioza kaj agrabla. La baldaŭ publikigota programo pruvos tion.

— Ĉiujn informojn oni petu de la Kongresa Oficejo, Gravinstr., 32, Borgerhout-Antwerpen.

Flandraj Esperantistoj aliĝu al la FLANDRA Kongreso!

Esperanto door Zelfonderricht.

7^e LES

Vertalingen der zesde les.

Traduko. — Kial vi ridas pri ĉi tiu viro? Mi donis al li dek frankojn. Kontraŭ la preĝejo staris tri arboj. Li laboras de la mateno ĝis la vespero. Ĉu vi iros al Antverpeno? Li mortis pro sia patrujo. Li partigis ĉion inter siaj infanoj Ĉiu numero kostas po unu franko. Kiom da personoj partoprenos la festenon? Ĝis baldaŭ! Sen familio. Sub unu tegmento. Li flugis trans la Skeldo. Tra la mondo. Laŭ mi, estus pli bone tiel. Unu por ĉiuj, ĉiuj por unu. La tero turniĝas de la okcidento al la oriento. Oni ŝtelis de tiu virino ĉiujn ŝiajn juvelojn. La adorado de la paŝtistoj. Estis longa sed bela promenado. Ĉu vi jam legis „Herberoj” de Walt Whitman?

Vertaling. — In het donker zijn alle katten grauw. Dank voor uw vriendelijken brief, dien ge me schreeft. De zon scheen aan den hemel. Mag ik u om een glas water verzoeken? Ik zal u tegen hem beschermen; heb dus geen schrik. Het dorp lag aan de rivier. De hoofdkerk is dicht bij het stadhuis. Het Ie Vlaamsch Kongres van Esperanto zal te Antwerpen plaats hebben gedurende Pinksteren. Komt talrijk! Hij weende van verdriet om den dood van zijn moeder. Ik zal overmorgen komen. De politiemann liep den dief achterna. Een centiem, een cent, een frank, een dubbele frank zijn geldstukken. Er zijn geldbriefjes van vijf, tien, twintig, vijftig, honderd, vijfhonderd en duizend frank. De staking der havenarbeiders duurde meer dan vijf weken. Weet gij iets over reflexbewegingen; — over de Bretoensche nationalistische beweging?

BEPALENDE, ONBEPALENDE EN BETREKKELIJKE VOORNAAMWOORDEN, BIJWOORDELIJKE VOEGWOORDEN, enz. — Deze worden gevormd volgens de hiernavolgende tafel.

| | Hoedanigheid | Oorzaak | Tijd | Plaats | Wijze | Bezit | Zaak | Hoeveelheid | Persoon |
|---|----------------------|--|------------------------|-------------------------|--|-----------------------------------|----------------------------|--------------------------|---------------------------|
| <i>Onbepaalde</i> | <i>ia</i> zekere | <i>ial</i> om zekere reden | <i>iam</i> eens | <i>ie</i> ergens | <i>iel</i> op gelijk welke wijze | <i>ies</i> iemand's | <i>io</i> iets | <i>iom</i> een weinig | <i>iu</i> iemand |
| <i>Vragende en betrekkelijke</i> | <i>kia</i> welk | <i>kial</i> waarom | <i>kiam</i> wanneer | <i>kie</i> waar | <i>kiel</i> hoe | <i>kies</i> wiens welks | <i>kio</i> wat, welk | <i>kiom</i> hoeveel | <i>kiu</i> wie, die |
| <i>Aanwijzende</i> | <i>tia</i> zulk | <i>tial</i> daarom | <i>tiam</i> dan | <i>tie</i> daar | <i>tiel</i> zóó | <i>ties</i> zulker, van die | <i>tio</i> dat | <i>tiom</i> zooveel | <i>tiu</i> die |
| <i>Verdeelende en Verzamellende</i> | <i>ĉia</i> elk | <i>ĉial</i> om alle redenen | <i>ĉiam</i> altijd | <i>ĉie</i> overal | <i>ĉiel</i> op alle wijzen | <i>ĉies</i> elks, van elk | <i>ĉio</i> alles | <i>ĉiom</i> alles | <i>ĉiu</i> ieder |
| <i>Ontkennende</i> | <i>nenia</i> geen | <i>nenial</i> om geener- lei reden | <i>neniam</i> nooit | <i>nenie</i> nergens | <i>neniel</i> op geener- lei wijze | <i>nenies</i> niemand's | <i>nenio</i> niets | <i>neniom</i> niets | <i>neniu</i> niemand |

— De woordjes uitgaande op U, zijn die voor personen, maar ook betrekkelijke en bijvoeglijke voor zaken: Jen estas la pomo, kiun mi trovis; hier is de appel, dien ik vond. Dit huis is het mijne; ĉi tiu domo estas mia.

— Het achtervoegsel EJ duidt de plaats aan bestemd voor hetgeen het grondwoord uitdrukt: kunveni, bijeenkomen; kunvenejo, vergaderplaats, lokaal; preĝi, bidden; preĝejo, kerk; lerni, leeren; lernejo, school.

— ESTR duidt het hoofd van iets aan: ŝipo, schip; ŝipestro, kapitein; trinkejo, drankhuis; trinkejestro, waard.

— AĈ geeft aan een woord een verachtelijke beteekenis: ĉevalaĉo, knol; domaĉo, krocht.

Vertaal. — Dat boek is groen. Dit is mijn boek. Ik spreek niet van dezen man, maar van dien. Van wie is dat huis? Het is van iemand dien ik niet ken. Diegenen die blind zijn, zijn ongelukkig. Wien zoekt u? Ik ben het, die het gedaan heeft. Wat een mooie roos! De dame, wier dochter uw leerlinge is, zal morgen aankomen. Elke minuut is kostbaar. De kinderen hebben al de appels opgegeten. Ik heb niemand gezien. Niemand is zeker van het uur van zijn dood. Ieder spreekt voor zichzelf. Wanneer zal hij komen? Nu of nooit! Waarom? Daarom! Zulke school, zulk volk. Als het bij den keizer jeukt, moeten de volkeren zich krabben. Zij zong niet, zij hilde.

WOORDENLIJST. — Blind, blinda; gelukkig, feliĉa; zoeken, serĉi; leerling, lernanto; kostbaar, multekosta; zeker, certa; nu, nun; keizerrijk, imperio; jeuken, juki; krabben, grati.

Traduku. — Tiuj, kiuj havas bonan konsciencan, estas feliĉaj. Kio faris ĉi tion? Unu el la knaboj. Kiu? Ĉi tiu. Tiuj estas precize la samaj naztukoj, kiel tiuj kiujn mi aĉetis la pasintan semajnon. Kia estas via nomo? Diru almenaŭ el kiu lando vi venas. Estas ĉiam tre agrable al ni pasigi kelkajn horojn ĉe niaj amikoj. Ne ĉiuj infanoj meritas la amon de siaj gepatroj. La kontraŭo ankaŭ okazas. Kies vico estas por skribi? La du infanoj, kiuj estis grave malsanaj, mortis hieraŭ. La urbo, en kiu ni loĝas, estas tre granda. La knabeto, kies patro subite mortis, loĝas en nia domo. Kio estas vera, ne ĉiam estas agrable. Antverpeno estas urbo, kies loĝantaro estas plejparte flandrema. Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ. Estu afabla por ĉiu. Dum milito la patriotaĉoj rifuĝas ie malproksime de la fronto en iu aŭ alia oficejo. Estru viajn sentojn.

WOORDENLIJST. — Konscienco, geweten; precize, juist; naztuko, zakdoek; pasinta, verleden; almenaŭ, ten minste; pasigi, doorbrengen; meriti, verdienen; kontraŭo, tegenovergestelde; vico, beurt; grave, ernstig; subite, plotseling; loĝantaro, bevolking; rifuĝi, zich verschuilen; fronto, front.

INTER NI.

El Sta. Nikolao. — Al Triumfo. — Laŭkutine la urbestro subtenis la grupon per la ĉiujara donaco de 100 frankoj.

En la decembra numero de „Belga Esperantisto” aperis artikolo pri nia grupo. Nek la estraro, nek la sekretario respondas pri tiu artikolo kaj la respondecon ni lasas al la Belga Ligo; protestleteron „Al Triumfo” jam forsendis al la ligestro.

La 29an. de Decembro 65 geamikoj ĉeestis la ĉiujaran Kristnaskfeston, inter ili estis deligitaroj el Aalst kaj Hoboken. Alvenis saluttelegramoj de la grupo el Ronse kaj de „La Rekta Vojo” kaj la Flandrema Grupo el Antverpeno.

Varma simpatio regis dum la tuta vespero kaj bonege oni sin amuzis. Muziko, kantado kaj deklamado sin intersckvis kaj laŭte la ĉeestantoj aplaŭdis f-inojn Van Hoeyweghe, Bruwiere kaj Truyens kaj s-ojn Van Hoeyweghe, Duerinck, Van der Smissen kaj Van Ghendt kaj ankaŭ la geamikojn el Aalst kaj Hoboken, kiuj kunhelpis por la sukceso de la festo. Varmajn aplaŭdojn akiris hungara samideano, ĉeestanta la feston, kiu aŭdigis kelkajn hungarajn kantojn; bedaŭrinde mankis ciganinstrumenta akompanado.

La hellumigitan kristnaskarbon, ŝarĝita per multnombraj kaj multvaloraj surprizoj oni ĝoje priabis. Ĉar nia kara prezidanto, s-ro Geerinck, ne povis ĉeesti, oni sendis, post longe kaj laŭte aplaŭdata propono de s-ro Beirens, saluttelegramon al li.

Ĉe la fino de la festo bombo eksplodis: S-ro Van Ghendt anoncis ovacie aklamate nian ekziĝon el la Belga Ligo kaj alvokis ĉiujn unu-anime kaj solidare kunlabori por nia grupo, precipe nun kiam novaj vojoj kuŝas antaŭ ni.

Flandrema Grupo Esperantista. — La Kristnaskofesto eksterordinare sukcesis. La programo kun per-porinfana parto kontentigis ĉiujn; la junaj artistoj rikoltis la plej grandan parton de l'aplaŭdoj. La alia parto denove pruvis — sed estas jam konate — ke ni havas en nia grupo verajn artistojn (eĉ kun barbo!). Ĉiuj infanoj ricevis oranĝojn kaj bildolibrojn kaj akiris ludilojn dum la porinfana lotumado. Post la lotumado por la granduloj, dum kiu estis gajnataj vere belajn kaj multekostajn premiojn, oni disdonis la surprizojn: ne bagatelaĵojn, sed agrablajn kaj konservindajn memoraĵojn. La prezidinto kaj reviviginto de la grupo, nia Ward, ricevis belan torton, kaj nia Jan speciale de nia germana amiko Fehr senditan bluzon. La multaj fremdaj samideanoj, kiuj ĉeestis la feston kaj kutimas ĉeesti niajn kunvenojn, ankaŭ ne estis forgesitaj. Saluttelegramon ni ricevis de niaj Sankta Nikolaaj sam-

ideanoj, dum iu Hobokena Grupano ankoraŭ aldonis ekstran numeron profite de „Flandra Esperantisto.”

Post la koncerto oni ankoraŭ dancis; nia blinda samideano Fiten tiam alvenis kaj aŭdigis sian kantadon kaj violonludadon.

La sukceson de la Kristnaskfesto la grupo tute ŝuldas al la inaj membroj, kiuj ĉion aranĝis eĉ la salonon!

La kunvenejestro oferis al la grupanoj kolbasbulkojn kun kafo okaze de Perdita Lundo. Tiu festo estis tute intima sed despli gaja!

La arko ne ĉiam povas esti streĉata, sed ankaŭ ne malstreĉata. Flandrema Grupanoj denove al la laboro ĝis Kristnasko, ne... ĝis la kongreso! — M a r t.

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.
Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”).
RICEVITAJ REVUOJ.

Bulgara Esperantisto, 2,3; Fluganta Skribilo, 1; Informoj de E.A.E., 94; Esperanto (Nippon), 7-8; Barcelona Ŝtelo, 13; Marto, 12; Utrechta Esperantisto, 12 (59-60); Holanda Esperantisto, 97, 98, 99; Breiz Atao, 80, 81, 82, 83; Nord-Okcidento, 3-4; Oomoto Internacia, 37a; La Movado, 127; International Language, 7; Dordrechta Esperantisto, 12; Irish Esperantist, 2, 3, 4, 5; Sennaciulo, 274; British Esperantist, 297; La Ora Epoko, 9; Internacia Medicina Revuo, 1; Lingvo Internacia, 3; Hinda Esperantisto, 6; Espero Katolika, 71; La Unuigita Tuthomaro, 6, 7; Schola et Vita, 10-12; Radio, 6 (kun noto pri nia revuo).

KOREKTOJ.

En nia lasta numero restis kelkaj eraroj (ĉu pro la Kristnaska kaj Novjara festoj?), kiujn niaj legantoj verŝajne plejparte jam mem korektis. Por trankviligi nian konsciencon ni mem mencias ilin:

Paĝo 97, 10a. linio de supre: ĉiulandaj anstataŭ ĉiulandoj.

Paĝo 98, 17a. linio de supre: laŭ sia anstataŭ laŭ ilia.

Paĝo 98, 2a. linio de malsupre: S.ta Nikolaa donaco anstataŭ S.ta Nikolao-donaco.

Paĝo 101, 14a. linio de malsupre: laŭ sia anstataŭ laŭ ilia.

Paĝo 107, 11a. linio de supre: forstreku mallongaj.

Paĝo 110, 14a. linio de supre: ovuloj anstataŭ ovuluj.

Paĝo 110, 15a. linio de supre: opinias anstataŭ poinas.

Paĝo 112, 1a. linio de supre: flandra anstataŭ flandran.

Paĝo 112, 13a. linio de malsupre: Schoor anstataŭ Schaor.

Paĝo 112, 6a linio de malsupre: nia anstataŭ ni.

Paĝo 112, 4a. linio de malsupre: flink anstataŭ fluk.

Niaj legantoj korektu la erarojn kaj pardonu nin! LA REDAKCIO.

Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32

BORGERHOUT-ANTWERPEN

Postĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West

Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.

Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de

Vlaamsche blinden.

Ĉiu literaturema esperantisto devas
posedi la belegan poemaron

AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor

kaj LA DU AMATINOJ

kun

LA KAPRICOJ DE MARIANO

de *Alfred de Musset*,

Tradukitaj de *Jan van Schoor*
kaj rekomendita de *Esperantista*

Literatura Asocio.

La prezo estas nur po 2 belgoj (send-
kostoj enkalkulitaj).

Ambaŭ verkojn mendu ĉe „*Flandra*
Esperantisto” aŭ ĉe „*Flandra Espe-*
ranto-Instituto”.

PAUL KUTSUKIAN.

Ĝenerala agento por la provincoj
Antverpeno, Okcident-kaj Orient-
Flandrujo de la aŭtomobiloj kaj
ŝarĝveturiloj

R E O

Ĝenerala agento por la provinco
Antverpeno de la tirveturiloj

INTERNATIONAL

TELEFONOJ : 916.48 - 985.15

Laborejo kaj Ekspozicia salono :

BELGIËLEI 149, ANTWERPEN.

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmund, Spalterbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet

Goede bediening.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{os} 143-144-145-146-147-179-180-

208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.

Drukkerij E. SELE, Prinsesstraat, 11, Antwerpen.